



Jarkolekto : 2011

Numero : 1

Paĝo : 1

La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responso eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe****www.senlime.org****Prezoj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).

ENHAVO :

p. 2 : Niaj programeroj lupee**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2011 (1/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Pri menhiroj kaj dolmenoj****p. 6 : Verviersa angulo : libro**

Trilanda Renkontiĝo en Napolo

Vidu p. 2



Pompei : ruinaĵoj de la forumo – funde : la vulkano Vezuvo

Bonan kaj feliĉan novjaron al ĉiuj !



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Kiom belas nia naturo

Inter oktobro 1972 kaj decembro 2005 – kiam tiuonate li decidis ĉesigi – Raymond **Demarche** estis agnoskita prelegisto en la provinco Lieĝo.

Li rajtis komentarii siajn lumbildojn en la franca lingvo (estis normale) sed plie en esperanto. Tiel li estis pagita same kiel dum franclingva prelego.

Li plurfoje faris tion. Cetere Sinjorino **Vertongen** (†) kelkfoje alvokis lin en la kadro de la **Klerigaj Aferoj Provincaj**.

Vi scias ke li vojaĝis en dekoj da Ŝtatoj sur nia terglobo. Ofte aventureme.

Multfoje li projekciis lumbildojn pri iu aŭ alia lando vizitita, dum kunvenoj en Verviers, Liège, La Calamine. Ĉiam en esperanto.

Por la 18-a de marto R. Demarche elektis duan centon da lumbildoj inter bildaro de tri guberniaj temoj. Tiel vi vidos pejzaĝojn, bestojn, bestetojn, florojn,...

Ĉiuj tiuj, kiuj ĉeestis la unuan parton de lia prelego, estis tute ravitaj. Ĉu li denove same sukcesos?

Ni plian fojon atendas vin multnombraj...

03-18 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Kiom belas nia naturo**" (2) , prelego de Raymond **Demarche**, kun lumbildoj.

Ĉu la hebraika lingvo devenas de la Egipta ?

La plej grava el la alfabetoj kiujn ni konsideru nune estas la alfabeto **watan**. Tiu alfabeto, kiu estis la origina skribmaniero de la **Atlantoj** kaj de la ruĝa raso, kies tradicio estis transdonita al **Egiptio** kaj Hindio post la katastrofo en kiu malaperis Atlantido, estas la ĝusta traduko de la astra alfabeto.

Ĝi enhavas tri literojn sinsekvajn (interrespondaj kun la tri personoj de la Triunuo, aŭ al la tri unuaj «**Sephiroth**», kiuj estas la tri unuaj nombroj el kiuj eliris ĉiuj aliaj), sep planedajn kaj dek-du zodiakajn, do entute dudek-du karakterojn...

Tiu alfabeto, kun kiu **Moseo** konatiĝis en la Egiptaj temploj, iĝis la unua hebrea alfabeto, kiu tamen ŝanĝiĝis dum la jarcentoj, sen tute perdiĝi dum la mallibero de Babilono.

La origina alfabeto de la Atlantoj estis konservita en **Hindio**, kaj dank'al la **Brahmoj** ĝi atingis nin; kaj pri la atlanta lingvo mem, ĝi dividiĝis en plurajn dialektojn, kiuj eble mem devenis sendependaj lingvoj, kaj unu el tiuj lingvoj pasis en Egiption; tiu **egipta** lingvo estis la origino de la **hebrea** lingvo, laŭ **Fabre d'Olivet**.

Por pliaj precizigoj...

04-15 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Ĉu la hebrea lingvo devenas de Egipta ?**", prelego de Ch. **Norga**. Inf. norga@senlime.org

Trilanda Renkontiĝo en Napolo

Imagu: invite de **Senlime**, iun sabaton tagmeze aviadilo surterigas kvardekon da esperantistoj en flughavenon de Napolo por speciala dutaga TLR.

Programo de la vizitoj :
Sabaton posttagmeze, Pompei
Dimanĉon matene, Vezuvo ;
posttagmeze, Herculanium.

Vespere, refugo al Bruselo...

Tiun belan semajnfinojn J-M. Jacques vivigos al vi per propraj filmetoj kaj dokumentoj kreitaj okaze de grupa vojaĝo al la golfo de Napolo kaj la Almafia marbordo (pri kio vi eble aŭdos kaj vidos alian fojon...).

Krom la pieda supreniro al la supro de la timiga vulkano, vi aparte ĝuos viziton de la ruinaĵoj de Pompei kaj precipe de Herculanium, pli bone konservita ol la unua (nun preskaŭ disfalanta kiel oni scias).

La (ora) «najlo» de la spektaklo estos la virtuala rekonstruo, antaŭ viaj okuloj, de la iamaj urboj... sendifektaj kaj kolorplenaj, piede de Vezuvo ege pli alta antaŭ ĝia terura kolerego ol nun...

Ne hezitu kapti tiun okazon, en fotelo, sen peno kaj sen danĝero, ĝui pri nekutima spektaklo, kompanse de la malĉeesto de vera trilanda renkontiĝo atendita tiuepoke...

05-20 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Virtuala trilanda renkontiĝo en Pompei** - raporto de J-M. **Jacques** pri grupa vojaĝo. Inf. jacques@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2010 (2/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).

01-21 Vintra paŭzo : pro la kutime malbonaj veterkondiĉoj ni **NE** kunvenos.

02-18 19h30 BE-Kelmis, Sélect: Ĝ.A. de Verviersa Esperantista Grupo kaj de **Senlime** (invito sekvos).
Inf. jacques@senlime.org

03-18 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Kiom belas nia naturo**"(2), prelego de R. Demarche, kun lumbildoj.

04-15 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Ĉu la hebrea lingvo devenas de la egipta?**", prelego de Ch. Norga.
Inf. norga@senlime.org

05-20 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Virtuala trilanda renkontiĝo en Pompei** - raporto de J-M. Jacques pri grupa vojaĝo.
Inf. jacques@senlime.org

06-17 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Karaoke de Senlime**.
Inf. lousberg@senlime.org



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **01-21, 02-18, 03-18, 04-15, 05-20** kaj **06-17** (karaokeo).

21-01 Pause hivernale : vu les mauvaises conditions météo. habituelles nous **NE** nous réunirons **PAS**.

18-02 19h30 BE-Kelmis, Sélect: A.G. du Groupe espérantiste de Verviers et de **Senlime** (invitation suivra).
Inf. jacques@senlime.org

18-03 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Comme est belle notre nature**" (2), conf. avec diapositives par R. Demarche.

15-04 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**La langue hébraïque vient-elle de l'égyptien?**", conférence de Ch. Norga.
Inf. norga@senlime.org

20-05 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Rencontre virtuelle à Pompei** – compte-rendu d'un voyage de groupe par J-M. Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

17-06 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Karaoke de Senlime**.
Inf. lousberg@senlime.org



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **21-01, 18-02, 18-03, 15-04, 20-05** et **17-06** (karaoke).

Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj EMRo.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

Pliaj promenantoj en Kelmis

Dimanĉon, la 21an de novembro, la asocio "Chemins du Rail" organizis promenadon (13km) en la belega regiono de la forpasinta ŝtato Neŭtrala Moresneto, en kiu la lingvo Esperanto, kiel oni scias, ludis rolon – (re)vidu la flandran TV-elsendon "Publiek Geheim" de la 6a de aprilo 2010 je la 20h40 ĉe CANVAS kaj (re)aŭskultu la radio-dokumenton (2010) de la scenaristino Katinka Baehr por la nederlanda OVT ("Het Vierde Land").

Partoprenis kelkaj esperantistoj instige de Herman **Deceuninck**, kiel la antaŭan monaton en Binche (biciklo-ekskurso de "Chemins du Rail").

La rendezuo estis ekde la 10h (foriro je la 10h17) apud la trajnhaltejo de Hergenrath (Kelmis). La promeno sekvis la vojon Emmaburg (kastelo) - Moresnet (pontego – varma tagmango) - Plombimonto (iama stacidomo kaj minejo) - Gemmenich - (buso al) Hergenrath kaj reiro (pasis trajno al Lieĝo-Guilemins je la 16h43).

Venu al PRINTEMPE

La asocio EsperantoLand planas internacian renkontiĝon dum pasko sub la nomo PRINTEMPE. Ĝi okazos en Dahlem-Baasem en la mezalta montaro Eifel, inter Kolonjo kaj Treviro (Trajna stacio estas Dahlem, oni veturas iom pli ol horon ekde Kolonjo).

Inf. : Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand
Tel. : +49-30-685 58 31

Stir-permesiloj senvaloraj

Laŭ Klaus **Willems**, iama policisto kaj fakulo pri la voj-kodaro belga, pridemandita de germanlingva gazeto "Grenz-Echo" [Landima eĥo], la germanlingvaj klarigoj dorse de la dokumento senvalorigus ĝin ĉar la Reĝa decido de la 23-a de junio 2010, kiu modifas tiun de la 23-a de marto 1998 pri la stir-permesilo, estas nek tradukita nek publikigita en la germana lingvo...

Jen kio pensigas nin pri la iamaj poŝtmarkoj de **Amikejo**, senvalorigitaj tuj post la apero ("historio eterne rekomencas")!

Moresnet-a kalvario

Sukcesa pilgrimada sezono finiĝis en la Moresnet-a kalvario. Kiel ĉiujare, la fino de la pilgrimada sezono estas festita ene de la fama kalvario (kies ttejon ni tradukis en esperanton).

Tiu-ĉi sezono estas pli sukcesa ol la antaŭaj pro la diversaj plibonigoj de la belega kalvario kiu, krom ĝia religia aspekto, similas al vera botanika ĝardeno kaj allogas ĉiujn ŝatantojn de maloftaj plantoj kaj arboj.

Okaze de la lasta dimanĉo de la sezono, la muzikistaro de Moresneto akompanis la statuon de la Virgulino kaj la fidelulojn tra la tuta kalvaria vojo.

Tiuokaze la publiko povis konatiĝi kun la unua diakono en germanlingva komunumo : Marc **Rompen**, kiu unufoje diservis la 19an de septembro.

Nemalhavebla verko

"Neutral-Moresnet-Neutre, Echos aus einem europäischen Kuriosum, Monographie der Euregio-Gemeinde Kelmis".

Okaze de la 90-a datereveno de la aparteno de la iama teritorio neŭtrala de Moresnet, ĵus aperis eldono ĝisdatigita de la rimarkinda verko de Leo **Wintgens**, kiu datiĝas de 1987, ĉe la "centro por lingvaj priserĉadoj" de Montzen.

En la verko (21 x 35 cm) enhavanta 304 paĝojn estas uzataj kvar lingvoj (germana, nederlanda, franca kaj angla), kun tradukoj en la lokan dialekton kaj videblas multaj fotoj (inter kiuj pluraj freŝdataj).

Rilate al la lasta prelego de nia historiisto Mathieu **Schrymecker**, rimarkindas ke la verko ankaŭ reproduktas malnovajn pentraĵojn pri la loka eltirada industrio kiu jam allogis la Burgoniajn dukojn: ni scias ke **Filipo la Bonulo** eĉ konfiskis la zink-kuŝejojn de la Akenaj ekspluatantoj en 1439 !

Oni povas akiri la verkon menciante la titolon kaj la n-ron ISBN 978-3-86933-024-2,

- en Belgio, ĉe OBELIT (Zentrum für Sprachforschung, rue Gustave Demoulin 4, 4850 Montzen; obelit@skynet.be);
Prezo : 39,90 EUR + 7,20 EUR (poŝtkostoj)
Konto : 731-0021321-53

- en Germanio, ĉe Helios-Verlag, Postfach 390112, D-52059 Aachen, helios-verlag@t-online.de

PRI MENHIROJ KAJ DOLMENOJ...

ENERGIA KURACADO

Estas konate ke la keltaj druidoj kuracis ĉefe per plantoj sed ankaŭ per revoj, paroloj kaj preĝoj, muziko kaj dancoj, k.t.p., ĉio kio kunkuras al la reharmonigi de la suferantoj.

Alia tekniko devas esti konsiderata, ĉar ĝi kontribuis al la kuracscienco de la keltoj: **magnetismo** kaj unu el ĝiaj variantoj, **te(lu)rismo**.

Krom la science agnoskita **placeba** (aŭ ŝajnkuracila) efiko, estas nun certe ke magnetismo interagas kun la homa korpo kaj kelkfoje uzeblas kiel (ofte nur komplementa) kuracmetodo.

Te(lu)rismo pristudas la magnetismon eldevenantan de subtera origino, kiu surface elŝprucas en kelkaj lokoj prefere al aliaj, kelkfoje profite al la vivantaj estaĵoj, kelkfoje malutile.

La ĉinoj jam de longe konas la efikojn de tiuj elŝprucoj, kaj ili nomas **fengŝuo** [**Feng-Shui**] la arton ilin administri kaj tiel koni la (mal)bonecon kaj (ne)taŭgecon de loko por konstruado de loĝejo(j) kaj tombejo(j).

Feng-Shui precize signifus «elirpordo de la drakoj». Ĉu nur hazarde legendo diras ke la ŝtono **Haina**, kiu super-staras la tutan megalitejon de Weris, estis elirpordo de la diablo?

Sekve de precizaj mezuroj, oni scias ke multaj megalitoj ludis la rolon de energiaj kondensatoroj aŭ dissendiloj. Oni rajtas pensi ke kelkaj el ili estis starigitaj de la antaŭkelta civilizacio – malofte de la keltaj druidoj mem – tiucele.

ESCEPTA CIVILIZACIO

Pri megalitoj ni certas ke ili ne estis starigitaj de la keltoj, sed de antaŭa civilizacio. Kiuj ilin konceptis kaj kiucele: jen la mistero ĉirkaŭanta ilin, samkiel la piramidoj cetere...

Tiuj homoj certe estis scioplenaj pri matematikoj kaj, plej strange, **astronomio**: ili ne nur konis la poziciojn de la **suno** kaj de la **luno**, sed ankaŭ faris diversajn kalkulojn.

Multaj ŝtoncirkloj (Stonehenge ekzemple) donas sunajn, kaj eĉ **venusajn**, fazojn. Plej ofte alliniigoj rilatas al **kalendarioj**, kaj laŭbaleoj estas strikte **orientitaj**.

Kiu vere kredas ke oni facile povas translokigi blokon da 35 tunoj (menhiro de Locmariaquer) per ŝnuroj kaj bastonegoj, tirigante centojn da homoj... en epoko kiam arbo estis tre malofte kaj multvalora kaj kiam la homoj estis multe malpli multnombraj ol hodiaŭ... eĉ sen konsideri la neceson antaŭe plej zorgeme glatigi la grundon kaj fine tre precize alĝustigi la ŝtonegojn?

Konklude, sovaĝuloj ne estus povintaj fari tian laboron, dum tre evoluinta civilizacio jes ja! Sed tio devigas nin rekonsideri niajn teoriojn (pra)historiajn! Tamen estas la sola rimedo por finfine trovi la bonajn klarigojn.

La keltaj druidoj, heredintoj de la korporacio kiu konstruis tiajn monumentojn, foje uzis tiujn lastajn por reekvilibrigi la kosmosterajn elŝprucojn. Tial oni rajtas paroli pri megalita medicino, surbaze de tiuj potencaj sed nevideblaj fluoj.

DOLMENOJ aŭ PIRAMIDOJ ?

La historiisto Henri **Martin** siatempe provis klarigon pri tio kio estis tumuloj kaj dolmenoj: malnovaj piramidoj! Multaj analizoj faritaj pri la grundo ĉirkaŭanta tiujn monumentojn montras ke ili konsistis el betono, tio estas sablo, ŝtono kaj cemento.

La menhiroj (starantaj ŝtonoj) nur estus la skeleto de la konstruaĵo, kiu postrestis, dum la betono – malpli solida – diseriĝis. La konstruintoj de la **Kromleĥoj** do estus piramidaj starigintoj!

Kompreneble restas nenio el tiuj verkoj ĉar betono estas rompiĝema: kio postrestos, post 5000 jaroj, el niaj pontoj kaj turoj? Ĉu iuj teramasoj ne estis piramidoj? En Egiptio, la plej malnovaj **piramidoj**, uzitaj, kvankam konstruitaj per rokoj, similas al tumuloj.

Se oni postulas ke la dolmenoj estis uzataj kiel tombejoj, tio ne senvalorigas la teorion de H. Martin: nenio malhelpis la sekvintajn popolojn poste devojigi tiujn konstruaĵojn de ilia unua celo kaj ene entombigi siajn mortintojn.

VIZITU MEGALITOJN

Estas facile viziti megalitojn, tiom ili multnombros, ne nur en Bretonio kaj Britio, sed ankaŭ interalie en **Weris**. Tie, pluraj tagoj necesus por ĉion vidi: la megalitojn mem, la elĉerpejon, la legendajn ŝtonojn... kaj la **muzeon** (nepre petu la **gvidilon en esperanto**)... sen paroli pri la mirinde trankvilaj arbaroj kaj kamparoj ĉirkaŭantaj.

J-M. J

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**rupa

Un ouvrage indispensable

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte

979-5327148-10

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation de **Senlime** est de nouveau obligatoire et fixée à 10 EUR (l'abonnement à ce bulletin en version «papier» s'élève à 12 € en raison de l'augmentation des coûts).*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2011 (EGV) 14 €

U.E.A. 2011 (MA-T) 61 €

Senlime (cotisation 2011) **10 €**

en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année
«cotisation de pour».



L'auteur, Léo **Wintgens**, Dr. en philologie de l'Ulg, présente fièrement son livre.

Léo **Wintgens** anime depuis 1995 un centre de recherches linguistiques baptisé **Obelit** qui milite pour la sauvegarde du dialecte local (plattdütsch).

Il a aussi publié "**Es Hat van os Plat**" [Le cœur de notre patois], une grammaire en plattdütsch.

Cet été, le centre de recherches a organisé son n-ième stage d'immersion linguistique d'une semaine pour les jeunes à partir de 8 ans.

La commune de Plombières et **Obelit** organisent en outre des cours de "Plat".

"Neutral-Moresnet-Neutre, Echos aus einem europäischen Kuriosum, Monographie der Euregio-Gemeinde Kelmis".

A l'occasion du 90^e anniversaire de l'appartenance de l'ancien territoire neutre de Moresnet à la Belgique vient de paraître une édition mise à jour du remarquable ouvrage de Léo **Wintgens**, qui datait de 1987, au "Centre de recherches linguistiques" de Montzen.

Dans l'ouvrage (21 x 35 cm) contenant 304 pages, quatre langues (allemand, néerlandais, français et anglais), avec des traductions en dialecte local, et on peut voir de nombreuses photos (dont plusieurs récentes).

En relation avec la dernière conférence de notre historien Mathieu **Schrymecker**, il faut noter dans l'œuvre la reproduction de tableaux anciens sur l'industrie extractive locale qui intéressait déjà les ducs de Bourgogne : nous savons que Philippe le Bon a même confisqué les gisements de calamine aux exploitants aixois en 1439 !

On peut acquérir l'ouvrage en mentionnant son titre et la référence ISBN 978-3-86933-024-2, pour le prix de 39,90 EUR

- en Belgique, au "Zentrum für Sprachforschung", rue Gustave Demoulin 4, 4850 Montzen;
obelit@skynet.be

N'oubliez pas vos cotisations...



Merci !

Texte en espéranto p. 4